

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

Esperantský překlad Rudého praporu

Ne bez hrdosti jsme zaznamenali, že autorkou českého překladu Rudého praporu je esperantistka, věrná pracovnice v našem hnutí a stejně věrná bojovnice za socialistický řád, Běla Raichlová-Krapková, která zemřela letos ve věku osmdesáti let.

Stejně jsme pyšní, že esperantský překlad Rudého praporu byl vydán nejprve v Čechách. Je dílem polského esperantisty, který se podepsal zkratkou S. K. Vydal jej r. 1912 Fr. J. Chaloupecký jako prvé číslo sbírky dělnických esperantských písní Laborista Internacia Kantaro. Byly to 4 malé stránky. Na první byl titul:

Ruĝa Standardo. Socialista marŝo de B. Czerwinski. Praha 1912. Eldonis La Kulturo, Lípová 8. Laborista presejo en Praha II, No 1959. Bohemio-Aŭstrio. Na druhé straně jsou noty. Na třetí text písně. Na poslední je esperantský insert La Kulturo.

Překlad zní takto:

RUGA STANDARDO

De l' sango' nia fluas lago,
de l' larmoj niaj fluas ĝi,
sed venos tago de l' repago,
juĝistoj tiam estos ni!
Juĝistoj tiam estos ni!

Kune do, sonu kant' de l' falang',
standardo flirtas en fulm' muĝa,
kaj kun ĝi nia venĝ' per lavang'
de la estonto dank'.
Koloro ĝia estas ruĝa,
ĉar sur ĝi laborista sang',
ĉar sur ĝi laborista sang'.

Disfalas jam malnova ordo.
Por ni do estu ĝi ekscit'.
Laboros ni en la konkordo,
egala estos la profit'.
Egala estos la profit'!

Kune do, sonu la kant' ktp.

Disiĝas kun la nokto nuboj,
kaduka jam malnova ŝnur',
malnovo falos en la rubojn,
eterne bono vivos nurl!
Eterne bono vivos nurl!

Kune do, sonu la kant' ktp.

Do kune agu la fratara
kun sama penso man' ĉe man'.
Haltigos nin nenia baro,
nek ektimigos uragan'.
Nek ektimigos uragan'!

Kune do, sonu la kant' ktp.

Malnobla baldaŭ mond' pereos.
For kun tiranoj kaj perfort'!
Ni mem la vivon kreos,
en kiu regos nova ord'.
En kiu regos nova ord'!

Kune do, sonu la kant' ktp.

ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

invitas al sia

regula jar-kongreso

en Praha la 17-an de junio 1951 je la 9-a horo
en Slovanský dům, Příkopy 22, ĉambro 5.

1. Protokolo pri la lasta kongreso.
2. Raportoj pri agado kaj pri la kaso.
3. Raporto de Kontrola komisiono.
4. Elektaj.
5. Liberaj proponoj.

SABATON la 16-an de jun. je la 20 h. okazos

amika kunesto kun programo

en klubejo de Esperantista Klubo en Praha II, Štěpánská 3,
rest. U Šumavy.

Ni esperas, ke venos multaj samideanoj ne sole el la ĉefurbo, sed ankaŭ el ĉiuj regionoj de la lando. Legu la raporton pri agado en la tria numero, por ke vi sciu detale, pri kio ni diskutos. Korespondaĵojn por la kongreso sendu al nia oficejo en Praha II, Malá Štěpánská 7.

La Kulturo byla orgánem Svazu dělnických esperantistů, založeného Chaloupeckým r. 1911. Svaz byl sekci Dělnické akademie. La Kulturo byla měsíčník a vycházela pravidelně až do vypuknutí první světové války v červenci 1914. Chaloupecký byl sociální demokrat levého směru, po založení strany aktivní komunista.

Po básni následuje toto poučení:

Ci tiu kanto, internacie konata inter revolucioj de tuta mondo, naskiĝis en malfeliĉa, sociale kaj naciece

sufereganta lando pola, en brusto de viro, kiu pasie amis ideon de liberiĝo de ĉiuj homoj. Lia kanto en Aŭstrio estas malpermesita, sed la interpelacio en aŭstria parlamento ebligis al popolamasoj libere ĝin kanti eĉ en la stratoj de imperia ĉefurbo. * Estas nia varma deziro enkonduki la esperantan tradukon de tiu ĉi revolucia himno, bele faritan el originalo de unu pola samideano, en tutan socialistan esperantistaron. »Ruĝa standardo« kun verda stelo — flugu tra la mondo, ekvarmigu koron, batvipu cerbojn, signalu batalon!

S. K.

Jaroslav Puřik: Pri homa feliĉo

Ĉeĥov verkis iam rakonton pri homa feliĉo, titolitan »Grosroj«. Nikolaj Ivanyĉ en ĝi trenas sin tra la enuo de guberniaj urboj, frotdefektas siajn manikojn ĉe inkmakulitaj tabloj de la financa administrejo, ŝparegas, portas eluzitan veston, sen amo kaj pro mono li edziĝas, la edzinon li turmentmortigas, kaj ĉion ĉi li faras por realigi sian vivodaŭran revon pri feliĉo: esti bienulo, posedi malgrandan, sed propran bieneton, ĉe kiu troviĝos bela domo, servistejo, ĝardeno, kaj antaŭ ĉio bedo da grosarbedoj. Fine la revo vere efektiviĝas, sed ĉio iel misiĝas: la terkulturistoj drinkas kaj priŝtelas la freŝdatan bienulon, ĉe la rivereto staras ostkarbo-fabrikejo, kiu fiodoras tage kaj nokte. Nikolaj Ivanyĉ maljuniĝas kaj dikiĝas kiel porko, kaj post kiam maturiĝis la unua rikolto da grosroj, li krakmordas ilin kaj esprimas sian plezuron. Tamen la grosroj estas liliputaj, fuŝaspektaj kaj abomene acidaj...

Tiaspeca Nikolaj Ivanyĉ ne estis tiam en la vasta Ruslando la sola, kaj tiaspecan acidan grosan feliĉon ĝuis kaj ĝuas, sin mem trompante, Nikolaoj Ivanyĉoj parolantaj kredeble ĉiujn lingvojn de l'mondo. Ĉeĥov — supozeble kiel neniu alia — montris, ke oni neniam povas esti feliĉa en socio, kiu la feliĉon registras en konteroj de negocluboj kaj kambias ĝin per bankbiletoj, Hodiaŭ, en la komenco de l' jaro 1951a, ni povas provi ĝiskonsekvence pripensi tion, pri kio Ĉeĥov ne povis plu skribi, sen ke li envadus en sferon de pura fantazio: kia estos la vera feliĉo, pri kia la homoj en liaj rakontoj tiom sopiris, amare bedaŭrante, ke ili ne povas vivi kvindek aŭ sesdek jarojn poste.

La burĝoj amis priridaĉi, kiam poeto nomis la socialismon fabrikejo de feliĉo. Sed la poeto estis prava, li pravis tiusence, *ke la socialismo kreas homan feliĉon konscie, laŭkonsidere, grandaskale kaj amase, same kiel laboras la modernaj fabrikejoj de la nuna epoko. Tion pruvas la ĵusa dua jaro de la Kvinjar-Plano, kondukanta nin al socialismo. Estas fakto, ke en nia lando ekzistas ankoraŭ iuj anoj de la feliĉo industrie-mezaklasa. La plimulto de nia popolo tamen jam nepre kunkreskis kun la afero de socialismo. La stato eĉ ne povas esti alia; oni devus ja esti vere blinda, por ne vidi la ĉiam pli evidentajn konturojn de la Ora Epoko de nia ĉeĥa kaj slovaka nacio. Neniam ja, eĉ ne en la fama tempo de la reĝo Senbarbulo, vivis tiel bone nia laborularo. Ĝi povis ja neniam manĝi tiom da viando kaj butero, neniam ĝi aĉetis tiom da libroj, kaj neniam sur la lernejbenkoj sidis en nia lando pli multaj infanoj gustumantaj la neelĉerpeblan trezoron de homa scio. Neniam ja la nialandanoj posedis pli aŭdacaĉan nek pli liberan perspektivon pri la estonteco. Kaj nur malmultaj sincere dubas kaj ne kredas, ke la jaro venonta estos ankoraŭ pli riĉa, ke ni vivos ankoraŭ pli bone ol en la antaŭa jaro. Cetere ja temas nur pri la unua Kvinjar-Plano, pri la unua, kiun sekvas pluaj kun verve ankoraŭ pli impeta. Se ni ĝiskonsekvence pripensas tiun ĉi perspektivon, eĉ nia spiro devas retenigi. Tamen pli multe ol la

ideo pri superplenaj tabloj devas nin eksciti kaj mirigi la atendo de forta krea batalo kontraŭ obstakloj, nobla lukto de homaj volo kaj scio, ekzerco de ties plej majestaj ecoj en batalo kontraŭ la naturo kaj elementoj. La ideo pri vivo tiom plena kaj agoriĉa superas la poezion de infanaj fantaziaĵoj kaj aventuroj, kiujn tiel bele elpensis Jules Verne.

Plene jam, je ĉiuj tri laborperiodoj komencas funkcii la socialista fabrikejo de feliĉo. Ofte ni eĉ ne konsciigas al ni, en kia epoko ni vivas, kaj kiel preskaŭ tro memkompreneblajn ni akceptas aferojn, kiujn ni prave devus ĉiutage miri kiel miraklajn spektaklojn de sorĉisto. Kiom da tiaj mirakloj okazis nur en la ĵuspasinta jaro! En nia fratlando Sovet-Unio kolosaj dragmaŝinoj enigis siajn mordorganojn en la teron, kaj homoj ekvarmis sur la grundo de l' unuaj konstruaĵoj de la komunisma epoko. Ĉimaniere antaŭ niaj okuloj utopioj kaj depratempaj revoj de l' homaro transformiĝas al registro pri translokitaĵ kubaj metroj, digitaj riveregoj kaj novaj gigantaj urboj.

Antaŭ kvar jarcentoj Thomas Morus, kiu lasis sian kapon sur eŝafodo, elpensis la fabelandon Utopion, en kiun li sendis sian Rafaelon Hytleodeus, »viron bonegan«, por ke li el sia vojaĝo alportu kaj anoncu al la homoj duonmorte vegetantaj sciigon pri lando de feliĉuloj vivantaj en komuneco de la posedaĵo, egaleco kaj libereco. Hodiaŭ la spiroj de la homaro ne bezonas plu direktiĝi al utopio situanta ie en malproksimaj maroj. Hodiaŭ ne estas plu necese, ke Tomaso Campanella loku sian Sunŝtaton en la elpensitan cejonan landon Taprobanon, hodiaŭ ne estas necese, ke Cabot elpensu kaj sendu sian Lordon Carisdall en la fabelon Ikarion, »kuŝantan en seshora navigacia distanco for de la orienta bordo de Marvolio«. Tia lando situas hodiaŭ inter la 77a grado kaj 43 minutoj de la norda latitudo ĉe la Kabo de Ĉeljuskin kaj la 35a grado kaj 8 minutoj de la norda latitudo apud la urbo Kuŝka. Ĝia okcidenta limo komenciĝas en la Golfo de Gdansk, kaj la ekstrem-orienta finiĝas sur la Kabo de Djejnjev en la Maro de Bering. En tiu lando proksima al la poluso efektiviĝas ĉio, kio estis reala en la majestaj kaj konfuzaj sopiroj de l' utopiistoj. En tiu lando estas realaĵo tio, kion proklamis antaŭ pli ol cent jaroj la Komunisma Manifesto, la unua programo de la scienca socialismo. Tiam la burĝaro klopodis por ridindigi la — kiel oni diris — fantasmagorion de la komunistoj-delirantoj, opiniante, ke neniu povas renversi ĝian reĝolandon de ruktanta kaj grasa sateco. Relegu hodiaŭ la centjaran programon pri la estonteco de l'mondo, kiun elkonstruos la laborista klaso. Al kia areto da homoj skribis Marx kaj Engels? Temis pri entuziasmaj laboristoj de la tajloro, ŝuista kaj meblista metioj kaj la unuaj proletoj el la naskiĝantaj fabrikejoj, ŝajne la lastaj el inter la lastaj. Hodiaŭ al iliaj nepoj kaj pranepoj apartenas sesono de l' mondo, hodiaŭ ili povas al la tuta mondo meti la demandon: kiu valoras pli ol ni?

Kiom da sensaciaj sciigoj venis en la ĵusa jaro el So-

vetio? Milkilometra kanalo el la rivero Amu-Darja al la Kaspika Maro, la elektrejo de Kujbyŝev kaj tiu de Stalingrad, la Dnepra baraĵo, la Krimea kanalo, tiu inter Volgo kaj Don... Bele kaj multsignife sonas por ni la vortoj, kiujn ni antaŭe ne konis: Uzboj, Tahia-Taŝ, Moloĉnaja, Cymljanskaja. Kaj se via animo ne estas seka kvazaŭ tindro, kvazaŭ kampo senkultura, ĝi sentas pri tiuj sciigoj ion el la ekzaltita ĝojo de infanoj, kiuj post somera ŝtormo eltoentas sur vilaĝan placon kaj kontraŭ la malklarajn riveretojn da varma pluva akvo kun febra rapido, sed ankaŭ kun serioza maldistreco de plenaĝuloj konstruas baraĵojn, kluzojn kaj fosas kanaletojn. Denove vi aŭdis ankaŭ vortojn konatajn: Stalingrad, Zaporoiĵe, Kaĥovka, Kalaĉ kaj Kujbyŝev. Oni tamen devas korekti la enhavon de tiuj vortoj. Stalingrad, ekzemple, tio ne plu signifas sole Corcin'on, kje Stalin direktas la batalon kontraŭ la kontraŭrevolucio, tio ne plu estas nur la urbo de la Kvinjar-Planoj kaj de la Traktor-Uzino, tio ne plu estas nur la heroa urbo, kie transpeziĝis la pesilo de la milito, tio ne plu estas nur la urbo de la ne malpli heroa rekonstruado. Hodiaŭ la vorto Stalingrad signifas ankaŭ kelkkilometran Volgo-baraĵon, gigantajn fluhaltigilojn, kiujn bruegante transflaras fluego da akvoj, miliardoj da kilovatoj da energio, milionojn da hektaroj da irigacata stepo, homojn, por kiuj la laboro signifas multe pli ol rimedon por vivoteno, homojn kun aliaj reciprokaj rilatoj... Kiel kapturna historio, kiel belega papilio elkoviĝis el la malbela krizalido de la duonstepo enua gubernia urbo, mortplagata per brando kaj malgrandurbecaj skandaloj en la tempo de Ĉehov.

Tamen en nia lando la stato ne estis alia. Antaŭ cent jaroj Klácel skribis siajn leterojn al Božena Němcová pri socialismo kaj komunismo. Ili finiĝis per la jenaj vortoj: »... Se oni nur dekonon de la mono elspezata por la pereigaj militoj uzus por kvieta laboro scienca kaj kultura kaj nobligo de la homaj mensoj! Kara fratulino, kun malĝoja koro mi rigardas la mizeran mondon, kiu tiel facile povus fariĝi paradizo, se oni la homajn malsaĝon kaj vantecon venkus kaj forpuŝus el la pordegoj kondukantaj en la urbon de Dio.« La plej bonaj el niaj homoj en la provinca ĉeĥa malgrandvivo revis ankaŭ pri feliĉa kaj libera mondo, kie la pene atingitaj akiraĵoj de la homaj klopodoj ne estos misuzataj por preparo de ĉiam novaj militoj. Kiom pli konkretaj kaj pli objektivaj estas niaj revoj, tiuj de ni homoj el la dua duono de l'dudeka jarcento! Ni povas spiri, ke ni propraokule ekvidu ekzemple la kanalon, kiun hodiaŭ fosas sovetianoj ne en Ikario, Utopio, Falansterio, sed en la ukraina Zaporoiĵe — kanalon tiel profundan, ke en ĝi kaŝiĝus dudek kvinetaĝa turdomego, kaj ĝian nivelon plue ondetigus nur stepa vento. Kelkiuj el ni propraokule ekvidos la lagojn artefaritajn ĉe Volgo, kiuj estas tiel grandaj, ke en ili malaperus nia tuta Moravio. Ni legas — kaj ni vidos ĝin filmite! — pri dragmaŝino, kiun por la Konstruaĵoj de Komunismo elkonstruis la uzino en Novo-Kramatorsk kaj kiu estas alta kiel deketaĝa domo kaj kies kulerego je unu svingo enprenas dek kvin kubometrojn. Ni scias, ke jam hodiaŭ verdas la junarbeto de arbarzonoj, kelkoble pli longaj ol nia Respubliko. Kelkiuj el ni promenos tra nove plantitaj bruetantaj arbaroj, kiuj senreste kovrus Belgion kaj Nederlandon.

Ne estas tamen eĉ necese vojaĝi en Sovet-Union. Se vi ekzemple atente tralegas la raporton de Gustav Bareš pri la perspektivoj, kiuj atendas nian Praha, devas vin kapti sento de ĝoja furoro kaj emo lukti kun taskoj tiel grandaj kaj aŭdacaj. Ne temas sole pri la perspektivo de la estonta grandeco. Jam hodiaŭ, kaj propraokule, vi povas vidi la ponton, kiu prezentas parton de la plano pri rekonstruo de Praha, propraorele vi aŭdas la pneŭmatikajn martelojn, kiuj tramordas tunelon sub la deklivo de Letná, kaj la plataĵo de Letná jam hodiaŭ ĉesas esti ĉagrena tenejo. La komunistoj ne kutimas paroli vane, kaj tial neniu bezono

nas pridubi tion, ke li baldaŭ promenos sur la grandioza Placo de Konstruantoj, ke oni rekonstruos la kvartalojn Žižkov, Libeň, ke sur la plataĵo de Pankrác elkreskos nova kvartalo, kaj inter Slivenec kaj Barrandov ĉarma universitata urbo... Kaj oni ne limigos sin sole al Praha; ĉiuj niaj urboj kaj vilaĝoj ekfloros, atingante belecon ĝis nun senekzemplan. Ankaŭ ĉe ni fine, en tempo ne plu neĝisesperebla, elkreskos aŭdacaj Konstruaĵoj de Komunismo.

Certe ekzistas en la mondo ankoraŭ homoj de la tipo de MacArthur, Truman, Dulles kaj Churchill. Vivas ankoraŭ la fimaljuno Burĝar'. Sole tial estas ebla la fakto, ke en la jaro de l'unuaj Konstruaĵoj de Komunismo — sociordo, al kiu la militoj estas same fremdaj kiel al ni la kanibalismo — la burĝaro povis ankoraŭ elfuriozigi militon kaj la mortantomulo MacArthur per cindro, skorio kaj sango makuli la matenecan landon de la korea popolo. Ni tamen vidis, ke la malvirtan manon de la brulkrimuloj, kiuj alproksimiĝis al la azia kontinento por ekbruligi dinamitan meĉon kondukantan al nova milito, oni surtretis kaj ke oni nun malmilde kaj senkompatate batas ilian malnoblan vizaĝon. En sia deliro ekminacis la ekstermisto Truman, opiniante, ke li venkos, se li la homamason endanĝerigos per centmiloj da brulmortigo. Sed kion propre volas tiuj — oni pardonu la esprimon! — homoj? Kion ili propre esperas, surpaŝante oratorajn tribunojn kaj promesante santon kaj denove santon, ŝviton, mizeron, malsaton, malsaton kaj militon? Hodiaŭ, en epoko, kiam la homaro jam havas antaŭ si konkretan bildon pri tero sen militoj kaj pri feliĉo, tiu societo rememorigas al ni la familion de praepokaj monstroj kaj megalosaŭroj, la diversajn podoke-, plateokaj ĵranosaŭrojn, misformajn kaj terurajn, kiuj elrampaĉis el siaj varmaj marĉoj por timigi la homojn kaj la infanojn, vekante ilin el ilia dormo. Hodiaŭ, en la jaro 1951a, estas necese ĉiam ankoraŭ batali kontraŭ tiu ĉi anakronismo, kontraŭ ĉi tiu ĉiam pli barbareca, pli prostituema kaj pli malnobla mondo, en kies kaĝo la homoj reciproke sin salutas: »kiom vi kostas?«, kie amikeco antaŭkondiĉas bone pagitajn ŝuldojn, kie la tempo kaj la amo estas nur mono. Estas necese en la intereso de l'paco kaj konservo de la homa gento kontraŭbatali tiujn pacrompantojn, kiuj al la homaro povas doni nenion plu, kiuj per nenio plu povas ardigi nek entuziasmigi homajn korojn.

Ni scias, ke vana estas ilia furiozado. Ili malaperos same nerevenigeble kiel la brontosauroj. Kaj sinjoro instruisto en tempo, kiam jam verdos fruktoĝardenoj en la Turkeстана dezerto kaj branĉoj de arboj fleksiĝos pro pezo de oranĝoj kaj figoj, en tempo, kiam blankos tufejoj da kotono sur senfinaj kampoj kaj nekalkuleblaj gregoj sin paŝtos sur sukoplenaj herbejoj, kie hodiaŭ eĉ kamelo blekas pro saifo, tiam sinjoro instruisto klarigos al infanoj cerboj tiajn nociojn, kiaj estas kapitalismo, milito, Wall Street, krizo, senokupeco. Kaj eble, por plifaciligi ilian komprenon, li alportos kaj sur la tabulon pendigos portreton de Truman aŭ Churchill, kiun la infanoj rigardos kun la sama mira intereso, kun kia la nuntempaj infanoj rigardas la elfosaĵojn el Pompejo.

Ni scias, kia estos nia venonta jaro. La mondo miregos pri novaj kaj novaj Konstruaĵoj de Komunismo, konkurantaj inter si per aŭdaco. Svoboda, Král, Bykov, la laborsturmuloj kaj stahanovanoj, konkeros novajn rekordojn de la liberigita laboro. Altflagre brulos nia vivo, estante oksidata al pli intensa flamo per la decidiĝo konkeri la pacon kaj deteni la sovaĝbestojn de l'milito inter la limoj de ilia ĝangalo. Kaj ĉe la flanko de tiu ĉi batalo, sole tie estas trovebla la vera — la homa, kaj ne la grosa — feliĉo. La homa feliĉo konsistas en batalo kaj lukto por ĝusta afero. Kiel tion esprimis la bilancanta Faŭsto de Goethe:

Jen la rezult' de ĉia saĝo vere:
Por indii la liberon, indii vivon,
Priluktu ĉiutage ĝin konkere!

Tradukis Miloš Lukáš

KRONIKO ENLANDA

Primatoro de la ĉefurbo Praha D-ro J. Vacek respondis la salutleteron de la jarkunveno de Esperantista Klubo en Praha per letero el 4. IV. 1951 Sig. 051.6-4-51-pres. Dr. Sl., kiu en traduko tekstas: Mi dankas pro via salutletero el via solena jarkunveno. Mi deziras al via plua laboro por nia laborula popolo kaj por konstruo de paca mondo maksimumon de sukcesoj.

P.W kun esperantisto. Eksonis startsignalo. Longa plotono de eminentaj ciklistoj el pluraj landoj ekmoviĝas. Lastaj mansvingoj al la afablaj Prahanoj. Kaj nun obstine antaŭen! Naŭtaga vetveturo je distanco 1500 km atendas la konkurantojn. Ĝi estas la fama ciklista Paca Vetveturo Praha-Warszawa. Sub la francaj koloroj veturas bluokula junulo kun decidplenaj trajtoj en la vizaĝo kaj rideto sur la lipoj. Kaj kun verda koro. Li estas franca samideano E. Dieudegard el Rouen. Li savas la situacion, ĉar ne povas manki esperantisto, se temas pri manifestacio por paco. Ni esperas, samideano Dieudegard, ke vi trovos varman akcepton ankaŭ flanke de esperantistoj en ĉiuj etaplokoj en ĈSR kaj Pollando, kiujn EAĈSR informis pri via alveno. Kaj ni akompanas vin per nia deziro: Bonan venton, s-ano Dieudegard! (30. IV. 1951 je la 14,30 horo en Praha. jm.)

Tutjapana Metalista Sindikato okaze de la unua de majo salutis Metalistan Ligon de Ĉeĥoslovaka Revolucia Sindikata Movado (ROH) per letero japan-kaj esperantlingva. Tiu oficiala uzo de Esperanto fare de grava sindikata organizaĵo meritas enskribon en nia Kroniko enlanda ankaŭ tial, ĉar nia amiko Saka Tadashi (Otohe-motomachi 394, Tsu, Mien) asertas, ke estas precipe merito de agado de niaj membroj en Plzeň, ke gvidantoj de la potenca tutlanda sindikato decidis adopti Esperanton por tiaj celoj. La leteron kun ĉeĥa traduko transdonis nia grupo en Plzeň el Centra Estraro de Sindikatoj (ÚRO) en Praha la 4. V. 1951.

Japanaj pacbatalantoj ricevintaj donackestetojn el Plzeň (vidu niajn paĝojn 4, 16, 40!) daŭre konfirmas al s-o R. Burda la ricevon de la kestetoj. Elstaraj personoj el la porpaca movado, kiuj ankaŭ estis inter la adresitoj, kompreneble ne konservis la enhavon de la kestetoj por si, sed disponigis ĝin al familioj de arestitoj. La Joshida-registaro severe persekutas batalon por la paco. La ĵurnalo »Heiwa no Kōe« (Voĉo de Paco), kiu kunligadis ĉiujn japanojn kontraŭantajn la militon, estis en januaro 1951 malpermesita kaj la redaktoroj, presistoj kaj distribuistoj enkarcerigitaj. En ĵurnalo »Rōdōsya« aperis letero el 22-a de marto de du infanoj, 7- kaj 5-jara, petantoj, ke oni redonu al ili la patrinon arestitan la 4-an de februaro nokte pro tio, ke en ŝia loĝejo estis trovitaj ekzempleroj de Heiwa no Kōe. — En ĉiuj leteroj estas esprimata danko pro la kuraĝigo, kiun donis la donackestetoj por la plua ankoraŭ pli impeta pacbatalo. La japanaj amikoj neniam cedos al imperlista teroro.

Paĝo de uzina semajna gazeto de Škoda-uzinoj en Plzeň »Škodovák« estis represita en sindikata gazeto japana »Kinzok Rōdōsya«. Temas pri artikolo de k-do Toman, en kiu li alvokas la laboristojn de Škoda-uzinoj, ke ili skribu pri siaj spertoj al japanaj kamaradoj.

Radio-Ostrava elsendadis ĉeĥlingve en traduko de Adolf Staňura el »El Popola Ĉinio« artikolojn »Virinaj laborantoj en popola Ĉinio« (24. 10. 1950) kaj »La unua virina traktorista trupo en Ĉinio« (19. 12. 1950). Ĝi estas tre taŭga uzo de verkoj de niaj ĉinaj amikoj.

Kongreson de polaj esperantistoj en Warszawa la 15-an de aprilo ni salutis perletere ĝojante, ke nia movado en frata popoldemokratia respubliko denove komencas vigli.

Regiono X. Brno. La tria regiona kunveno okazis dimanĉe la 15-an de aprilo en hotelo Passage en Brno. Sabate vespere Esp. klubo preparis en la spegulĉambro de la hotelo Passage por honorigi la gastojn artvesperon kun riĉa programo, al kies plena sukceso kontribuis per siaj prezentadoj s-ino Eva Suchardová, koncerta kantistino s-ino Eliška Kalousová, prof. Vil. Scheiber kaj junularo de Brna klubo sub gvido de Drah. Chlubnová. Tiun ĉi bonege sukcesintan vesperon partoprenis 80 s-anoj.

La reg. kunveno kunvenigis 39 s-anojn. Venis gastoj el Praha, Chotěboř, Karl. Vary, Hradec Král., Týniště n. O. kaj Háj apud Opava. El la Brna regiono estis reprezentitaj lokoj: Brno (18), Židenice (4), Břeclav, Dyjčkovice, Lanžhot, Mikulov, Rousínov, Řeznovice, Svitavy kaj Vyškov. Reg. peranto J. Friedrich raportis unue pri la movado en la regiono. Escepte la klubon en Brno, kiu montras ĉiam tre viglan agadon, la movado dum la lasta jaro iom stagnis. Tial nia regiono, kvankam ĝi restas sur la tria loko en Ĉeĥoslovakio per sia nombro de 342 organizitaj esp., perdis dum la lasta jaro 20 membrojn. La ĉefaj kaŭzoj estas granda fluktuo de membroj, malfavora tempo por propagando kaj manko de vortaroj kaj lernolibroj.

La ĉeestantaj reprezentantoj de supre nomitaj lokoj prezentis siajn raportojn. Laŭ ili en la administra j. 1950/51 okazis en Brno 3 kursoj por kom. kaj 2 por progres., en Tuřany 1 progres., en Židenice kaj en Lanžhot po 1 por kom. La klubo en Brno aranĝis dum la Brna specimena fairo 1950 bonan reklamon per aparta ekspoziciaĵo. Ankaŭ la plej grandan ĝis nun landan kongreson ĉeĥoslovakian preparis en 1950 Esp. klubo en Brno.

Vicprezidanto de EAĈSR R. Hromada el Praha raportis pri la nuna stato de intertraktado kun oficialaj institucioj koncerne la novan organizan formon de nia movado, parolis pri preparoj de nova eldono de esp.-ĉeĥa vortaro kaj pri aliaj gravaj problemoj de nia landa movado. Redaktanto de »Esperantista« D-ro St. Kamarýt akcentis la ĝojigan fakton, ke nia junularo komencis pli fervore labori, kaj iniciatis diskuton pri la enhavo de »Esperantista«. La diskutadon partoprenis s-anoj D-ro Vaněk el Karl. Vary, Pyloun el Hradec Král., Trojna el Břeclav, Kořínek el Brno kaj s-anoj Nývltová el Praha (raportis pri junulara movado), Síchová el Háj apud Opava, Suchardová el Týniště n. O. kaj Chlubnová el Brno.

Por la nova jaro estis reelektita regiona peranto J. Friedrich el Brno (Hoblíkova 8) kaj konfirmitaj distriktaĵperantoj R. Trojna en Břeclav, L. Rýznar en Svitavy — Čtyřicet Lánů kaj J. Herdin en Letovice. (J. Fr.)

Regiona kunveno de la XIII-a regiono okazis en Háj u Opavy la 29-an de aprilo. Ĉeestis 64 partoprenantoj el 20 lokoj. Por la Centra Komitato ĉeestis vicprez. Rudolf Hromada, kiu informis pri la aktuala situacio precipe pri traktadoj por eniĝo de nia organizo en sferon de sindikataj kulturkluboj kaj prelegis por novaj esperantistoj pri la ĉs. movado inter la du mond militoj. El Slovakujo venis redaktanto de Esperantisto Slovaka dr. L'ud. Izák, kiu prezentis informojn pri organiza stato en Slovakujo kaj akceptis interŝanĝe sciigojn pri aktuala sinteno de instancoj en Praha. Laŭ sciigoj donitaj de regiona peranto Vlad. Slaný kaj de perantoj distriktaĵ en Ostrava-regiono jam ĉiuj esperantistaj grupoj eniĝis ĉu en sindikatajn kulturklubojn en minejoj aŭ uzintoj, ĉu en klerigajn kunularojn (osvětové besedy). Ie jam estas tre videblaj la avantaĝoj el tiu novaranĝo. Ekz. grupo en Opava eniĝinta en klerigan kunularon ricevis de ĝi por sia uzo klubojon en bela Kulturdomo, por kiu en pasinta jaro oni postulis de nia grupo lupagon 4000 Kčs. La tutan kunvenon ĉeestis prezidanto de la distrikta ago-komitato de Nacia Fronto s-jo Fr. Šmíd, kiu atente sekvis la agadon, akceptis ĉiajn informojn pri nia movado kaj promesis subteni ĝin.

La paĝoj 53-60 verŝajne enhavis vortaron de Hromada, kiun iu elprenis kaj bindis. Tial ĝi mankas en la skanitaj ekzempleroj de la gazeto.

Esperanto-Servo ankaŭ en j. 1951 havas pli grandan amplekson. La 4-a numero estas 4-paĝa, krom la 4 regulaj numeroj januaro-aprilo aperis »daŭrigaĵo« kun represo de la rakonto de Jiří Marek: Parolas la patrino. La rakonto fariĝis fama en la tuta mondo, aperis jam pluraj tradukoj el la esperantlingva teksto, kaj venas daŭre petoj por sendi koncernan numeron. Ĉar ĝi estis jam delonge elĉerpita, E.-S. eldonis la rakonton denove. Samideanoj ĉeĥoslovakaj! Zorgu, ke neniu ekzemplero de E-Servo restu enlande, dissendadu ĝin regule al viaj korespondantoj en la tuta mondo!

AKRA-kudriloj, La eksportkompanio Koh-I-Noor en Praha donis al siaj maŝinkudriloj la esperantlingvan nomon AKRA kaj eksportas ilin sub tiu nomo ĉien, kie estas kudromaŝinoj. Pro sia supera kvalito (i. a. absoluta nerosteblo) disvastiĝis tiuj kudriloj en ĉiuj mondpartoj. lagrade helpis en tio la ĉie aprobe akceptita nomo AKRA.

Artikolo de Anna Alamo-Sandgren pri »Postsignoj de Waldenaj Fratoj« el »Dia Regno« aperis en ĉeĥa traduko de J. Šupichová en Kostnické jiskry el 1. III. 1951.

Junularo esperantista viglas. Aperas ciklostilitaj cirkuleroj: Vokas vin Praha (Praha XII, Poŝtkesto 46), Opava-cirkulero (E. Klubo en Opava), Juna Voĉo (Poprad, Masarykovo náb. 62).

Aŭdite en tramo. Mi veturas per tramo en la Jindřišská-strato en Praha. Apud mi staras grupeto da junular-ascianoj kaj babilas pri farota ekskurso. Ordinara afero. Fine unu el la junuloj demandas, kie ili kunvenos antaŭ la forveturo. »Ni renkontiĝos antaŭ la Wilson-stacidomo ĉe Esperanto«, proponas la alia. »Nu jes, sed kie ĝi estas?«, rediras la unua. »Ĥe, li ne scias, kie estas la Esperanto-Infoformo!«, mokas lin la ceteraj. »Estas ja la grandaj fenestroj en bazaro tuj apud la Wilson-stacidomo«, ricevas instruon la ridinda nescianto. »Do konsentite.« Kun tiuj vortoj la junuloj forlasas la tramvagonon. — Ĉu tio estas malforta argumento por tio, ke la Esperanto-Infoformo fariĝas orientiĝa punkto por Prahaanoj? (jm)

Ĉina laborista teatro. »Ĉínské robotnické divadlo« estas tutaĝa artikolo pri ĉina teatro, tradukita de EVT el la gazeto »El popola Ĉinio« kaj publikigita en nro 7 de Naše divadlo, Turč. Sv. Martin.

* * *

Internacia Kulturo. Laŭ informoj el Sofia reorganizas kaj modernigas la Bulgara ŝtato la presistajn entreprenojn, likvidante la malgrandajn kaj primitivajn presejojn. Tial devis Internacia Kulturo likvidi sian propran presejon kaj vendi ĝin al la ŝtato. Tamen la eldonejo esperas, ke ĝi baldaŭ povos rekomenci la eldonadon de la revuo, kiu estos presita en moderna ŝtata presejo.

La multaj ĉeĥoslovakaj amikoj de Internacia Kulturo bonvolu do pacienci kaj atendi nian novan sciigon, kiun ni donos tuj post alveno.

El Japanujo venis en la Asocian oficejon esperantlingva poŝtkarto, kies adreson la poŝto ne sukcesis deĉifri. Ni legas ĝin proksimume jene: »S-ro Miloslav Batel, Karel Prokeš coro Vápenný Podol.« Ni kun plezuro ĝin transdonos al la ĝusta adresita, kiu bonvolu sin anonci.

La tradicia somera kunveno sur surlima monto Ĉantorio okazos la 24-an de junio kaj al tiu ĉi kunveno en belega montara regiono, estas kore invitataj ne nur gesamideanoj el regiono Ostrava, sed ankaŭ el aliaj regionoj; precipe ni sincere bonvenigus niajn fratojn slovakajn. Eventualajn informojn petu de s-ano Vladimír Slaný, regiona peranto, Kutuzovova 29, Ostrava-Vítkovice. (V. S.)

El la »Kantoj de la sklavoj« de Svatopluk Ĉech.

Kanto XIII.

Griza avo, stulta sklavo
mate kuŝas post labor',
sian rizon li englutas,
laŭdajn vortojn li balbutas
pri la skurĝo de l' sinjor'.

Lin mokante, ornamante
lian bruston per moner',
la sinjoro lin prezentas
— sklavo sin fieras sentas —
»Jen, por sklavoj la model' le«

»Por mi sankta cel' brilanta
estis gajno de l'sinjor',
kaj pro tia ĉi fervoro
min ornamis la sinjoro
per insigno de l'favor'.

En okulo ros-nebulo,
pro l'feliĉ' tremetis haŭt',
kiam al mi sur klinitan
nukon sklave mallevitan
venis signo de la laŭd'!

Dankas koro pro l'honoro
de neforgesebla hor',
kiam rajtis mi ĝis koto
klini kapon, kaj de boto
kotmakulon leki for!

Dia sorto, ke ĝis morto
servu mi, ho jen model'!
Kantu himnojn, li la laŭdante,
kaj samtempe malbenante
ĉiun provon de ribel'!

Kia ĉojo, Lia vojo
ke konduku trans la lok',
kie sub ter' mia koro
putros iam post la morto,
tie paŝu Lia bot' le«

Tradukis Erinazzo.

KORESPONDI DEZIRAS

Stefan Ivanov, Car Samvil 75, **Burgas**, Bulgario.
Jančo Georgiev Fristov, str. Bitolja 23, **Burgas**, Bulgario.
18-jara studento Hermann Jeckel, Marktplatz 12, **Rottenburg** (Neckar), Germanio pri ĉiuj temoj, kolektas pm, pk.
Jaroslav Adolf, U cementárny 16, **Ostrava V**, ĈSR, kun la tuta mondo.

Radio Sofia. Notu, ke la ĝusta ondolongo estas 39,11 m. La stacio disaŭdigas en Esperanto regule ĉiun mardon, vendredon kaj dimanĉon de la 19-a ĝis 19,50 horo. Aŭskultu kaj konfirmu la aŭskulton al Radiostacio Sofia.

Geografia karto de ĈSR sur duobla poŝtkarto.

Bonega propagandilo. Aĉetu kaj donacu al viaj amikoj! 10 pecoj afrankite por Kčs 21,50.

Mendu ĉe la Librovendejo de EAĈSR!

Na str. 53.—60. otiskujeme esperantsko-ĉeský slovníček pro první potřebu našich nových čtenářů. Upozorněte nečleny Svazu ve Vašem místě, že si slovníček mohou opatřit (s časopisem), přihláší-li se za člena Svazu.

Svazová kancelář bude uzavřena 16.—28. července po dobu dovolené.

NI LEGIS

Ritmojn en Esperanto esploris statistike D-ro Cecil Bean (en Esperantologio, 3-a n-ro, marto 1951). Laŭ liaj rezultoj respondas al natura ritmo de esperanta prozo pleje la amfibrako (o - o). Koeficiento de ĝia »natureco« estas 0,67, se natura ritmo de la prozo estas esprimita per koeficiento 1,00. Ritmoj jambaj kaj trokeaj estas egalkoeficientaj 0,56 (o— o— o— o— o— kaj —o—o—o—o—o—). Tio frape kontrastas aserton antaŭ nelonge defendatan, ke trokeo estas la plej taŭga esperanta ekvivalento por la anglaj jamboj. Preskaŭ same altan koeficienton kiel amfibrakoj havas ritmoj daktila-trokeaj (0,63); la plej altan havas heksametro (senspondeaj) 0,68.

Statistiko de 50 000 tekstvortoj farita de D-ro Leo Blas, lektoro de Esperanto ĉe la Universitato en Innsbruck, aperis en Esperantologio n-roj 2 (junio 1950) kaj 3 (marto 1951). Estis kalkulita ofteco de ĉiuj vortelementoj. La materialo estis prenita el unuopaj paĝoj de tre diversaj verkoj. En la fino estas resumaj tabeloj kaj tabelo de »radikoj ordigitaj laŭ ofteco po-milo«. Laŭ ĝi la plej oftaj radikoj estas: la 41,38 po el milo, de 17,44‰, kaj 16,99‰, mi 12,32‰, si 4,17‰, ili 4,06‰, kun 4,00‰, -ad- 3,86‰, el 3,81‰, ĝi 3,76‰ ktp. Substantivoj (Blas preferas diri o-vortoj) estas 108,40 el milo, sed verboj nur 74,10‰ kaj adjektivoj ne tro mapli 63,65 el milo. — Tiu ĉi traktato de d-ro Blas estas tre rimarkinda, ĉu pro amplekso de la esplorita materialo, ĉu pro detala tra-kalkulado.

Kontraŭ la senpense facila enkonduko de naciecaj esprimoj en Esperanton ni ne povas tro riĝe batali. Se ni volas efektive kaj efike gardi kontraŭ disdilektiĝo, ni devas stude kaj inteligente formi novajn esprimilojn el nia jam ekzistanta linavomaterialo, forpuŝante la allogan diablon de ŝajna »internacieco«. Miriado de vortoj kaj esprimoj similaj en formo estas tute alisencaj en la diversaj linavoj. Ne la akuzativo aŭ la ĉapelhavo literoj, sed la semantiko (la scienco pri la senco de vortoj) estas la ĉefa afero, pri kiu nia penso devas esti okupata. (La Rondo, decembro 1950 redaktoro F. R. Bonham.)

Internacia Grafika Federacio en Bern korespondas en Esperanto. La sekretario de la Klubo de Grafikaj Esperantistoj en Nederlando informis I. G. F., ke okazos SAT-kongreso nuniare en Stokholmo, kaj ke grafikistoj el la kongresanoj kutimas kunveni kun samfakuloj kaj kolegoj en la kongresurbo. Por oficialigi tion kunvenon li petis, ke I. G. F. aprobu ilin kaj sciigu tion al la sindikato en Stokholmo. La federacio respondis esperantlingve, kaj la lasta alineo de la letero tekstas:

»Via iniciato favori kunvenojn de la esperantistaj kolegoj en la loko de la SAT-kongreso estas simpatia al ni. En tiu ĉi senco ni skribas al niaj nordlandaj asocioj. Dume ni deziras al via internacia kongreso en Stockholm la plej bonan sukceson. Salutas vin kamarade Internacia Grafika Federacio. La prez. A. Schäfer, la sekretario Ch. Woerler.« (Informilo de I. G. E. L., aprilo 1951.)

Ni ne deziras preterlasi noton — kvankam malfruan — pri nia kologo La Revuo Orienta en Tokio, kiu dum 1950 ripete aludis aferojn ĉeĥoslovakajn. En nia 2-a n-ro (p. 17) ni reprenis kovrilon de tiu revuo kun kopio de prospekto pri Karlovy Vary. En januaro 1950 ornamis la kovrilon de La Orienta Revuo bildo de du geknaboj, vestitaj en riĉa kostumo moravi-slovaka. Kaj en aprila numero pasintjara ni legas en artikolo »De nederlanda flegistino al japana medicina studento« i. a.: »... Ĉu vi konas la belan muzikon de Tsaikowski? kaj »Die Moldau« de Smetana? Smetana estas ĉeĥa komponisto kaj Moldau estas rivero, kiu fluas tra la ĉeĥa urbo Praha. La simfonia komponaĵo »Die Moldau« sekvas Moldau ekde la komenco en la montaro ĝis ĝia fino. Oni aŭdas, kiel la akvo formas

rivereton, kiel ĝi pligrandiĝas, kiel la grandiganta rivero trafluas la arbarojn, kie estas ĉasistoj, kies kornon oni aŭdas. Plue la rivero venas en vilaĝon, kie estas popol-dancoj, kiam venas rapidfluo kaj kiel la komponisto elpremas siajn sentojn! La travivaĵoj en la naturo, la amo de la homo al la lando estas tre belaj!... « Ni kun ĝuo legis la artikolon ĝis fino kaj aldonas komplimenton al la inteligenta samideano nederlanda, kiu ĉerpis siajn informojn certe de esperantisto ĉeĥoslovaka. Ĉeĥa nomo de »Moldau« estas »Vltava«. (O. G.)

Filmoj kaj teatroj kontraŭ agresio. — Ekde la 12-a ĝis la 18-a en decembro de 1950 akompanante la kontraŭ-usonon kaj porkorean movadon aranĝiĝis en Pekino filma semajno de popoldemokratiaj landoj. Prezentitaj estas entute ok filmoj: t. e. Ivan Susanin el Bulgario, Silenta Barikado el Ĉeĥoslovakio, Ĉiam Preta el Germana Demokratia Respubliko, La Tero Sub Via Piedo el Hungario, Mia Hejmvilaĝo el Koreio, La Lasta Stadio el Pollando, Sonoras la Valo el Rumanio kaj du dokumentaj filmoj el Mongolio: La Mongolia Popola Respubliko kaj la 29-a Datreveno de la Mongolia Popola Respubliko. La prezentadon vizitas ĉirkaŭ 8.000 personoj inkluzive laboristojn, kamparanojn, armeanojn, lernantojn, kulturajn laborantojn kadrojn en ĉiuj organizaĵoj kaj oficistojn en la ambasadorejoj de la frataj landoj. Ĉiuj tiuj filmoj ricevis entuziasmajn aplaŭdojn. — Tio plene montras la ardan amon kaj amikecon de la ĉina popolo al la frataj demokratiaj landoj.

En la kontraŭagresia movado literaturaĵoj ludas gravan rolon en propagando. Nur en lastaj du monatoj centoj da literaturaĵoj temantaj pri usona agreso estas verkitaj. Por bone konigi la verkojn kaj pli disvastigi la propaĝadon en la vesperoj de la 23-a kaj 24-a en decembro 1950 en Pekino aranĝiĝis dramprezentado de la novaj verkoj. Prezentitaj entute 15 teatraĵoj. Inter ili troviĝis jangodramoj Por Protekto al Produkto kaj Firme Tenu la Pafilon opera Venko Apartenas al la Popolo kaj dramoj Popola Volo, Frateco, Junaj Gerilanoj kaj La Patrino Koro. Krome prezentitaj ankaŭ diversaj artformoj ekzemple ritmaj rapid-rakontoj, spritaj dialogoj kaj kantoj kun diversaj muzikaj akompanoj. (El Popola Ĉinio, jan. 1951.)

Pri vizito de ĉsl. kultura delegitaro ĉe Ĉina Esperanto-Ligo, la 2-an de januaro, pri kiu ni informis sur nia paĝo 41, raportas detale januara numero de »El Popola Ĉinio«. La ĉsl. delegitaro alparolis Ĉ. Ĉen en nomo de la Ligo, Huijuz, estro de la Centra Eldona Administracio kaj pioniro de la ĉina E-movado. Honfan reprezentanto de la redakcio. El la ĉsl. delegitaro parolis Z. Hrdlička salutante en nomo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj kaj D-ro J. Průšek ĉinlingve esprimante sian opinion pri la rolo de Esperanto en la pacbatalo. Apud la artikolo estas bildo de ĉiuj ĉeestintoj, en mezo sidas D-ro Průšek. La akcepto de la ĉinaj esperantistoj evidente tre favore influis la ĉeĥajn delegitojn, ĉar ili raportis pri tio proprainicite, kiel ni legis en la artikoleto tradukita en nia kvara numero. Niaj kamaradoj ĉinaj estu salutitaj pro sia tre bona agado.

En »Internacia Kulturo« el 1950 n-roj n-ro 3/4 aperis tradukoj de Ad. Staĥura »Ostrava« kaj »Tri kolonoj de hispana literaturo«. Ni enskribas tion iom malfrue, sed ni uzas la okazon por atentigi pri ebleco, ke Internacia Kulturo reaperos kiel ni sciigas en tiu ĉi numero sur alia loko.

Liston de kemiaj elementoj kritike kompilis kaj en Scienca Revuo (4-a numero en 1950) publikigis D. R. Duncan. Li esploris la ĝis nun uzitajn esperantajn nomojn kaj la liston de Internacia Unio de Pura kaj Aplikata Kemio el 1949 kaj starigis liston de nomoj zorgante, ke tradicio ne estu

rompata sen grava bezono. Laŭ ebleco li evitas la pseŭdo-sufikson -um-. Tie, kie estas bezone, li donas ankaŭ nomojn de mallongigoj uzataj por nomi diversajn element-grupojn. Krom Nitrogeno estas donita ankaŭ Azoto, tre saĝe, ĉar tiu ĉi nomo estas en tre multaj lingvoj kaj por kombinaĵoj oni bezonas la ambaŭ mallongigojn az(o)- kaj nitr(o)-. Ĉe Silicio estas Silico proponata kiel nomo de oksido kaj Siliko kiel nomo de mineralo. Titanio preferinda al Titano, Prometio (n-ro 61) supozeble preferinda al Ilinio kaj certe al Iliniumo, n-ro 74 Tungsteno aŭ Volframo, Plateno preferinda pro oficialeco al Platino, Emanacio eble estas la plej taŭga nomo por elemento 86. En la fino de la listo estas transuraniaj elementoj: Neptunio, Plutonio, Americio, Kuriumo, Berkelio, Kaliforniumo. Uranio certe preferinda al Urano.

Por nomi salojn oni aldonas -a, -oza, -ika aŭ -ila al mallongigita kombina formo (laŭ al la tuta radikoj, se mankas mallonga formo) de la nomo de la kationa elemento, kaj -ido, -ito aŭ -ato al la (eventuale mallongigita) radikoj de la nomo de anjona elemento, uzante la prefiksojn hipo-, per- tio- peroksi- k. t. p. laŭbezone; ekz. kalia klorido KCl, natria hipoklorito NaClO, feroza bromido FeBr₂, ferika bromido FeBr₃, kalia kromato K₂CrO₄, taloza klorido TiCl₃, talika klorido TiCl₄ k. t. p. Acidojn oni nomas laŭ la saloj; ekz. HCl estas klorida acido, H₂SO₄ estas sulfata acido k. t. p. NH₃ estas amoniako, NH₄ estas amonio, NH₄Cl estas amonia klorido.

Mi citis s-ron D. R. Duncan laŭvorte, estas plezuro reciti lian klaran stilon.

Portreto de Věra Borská, oper-kantistino en Brno aperis en Heroldo la 1. XII. 1950. Ŝi kontribuas al artaj programoj de la E. K. en Brno ĉu persone kantante ĉu edukante amatorajn trupojn altnivelajn. Ŝi kun granda sukceso kantis en koncertoj dum la kongresoj en Liberec kaj Brno, en templo-koncertoj en Karlovy Vary kaj Doksy kaj en pluraj aliaj esperantistaj artismaj programoj.

LOKAJ INFORMOJ

Brno. — Programoj de kunvenoj de E. K.: 8. V. Historio de la mondlingvo. II-a parto. (Josef Friedrich.) 15. V. Frant. Sokol-Tůma, verkisto de Ostrava-regiono (Drahomíra Chlubnová). 22. V. Tridek jaroj de la ĉeĥoslovaka komunistarta partio (Marie Adamcová). 29. V. La plej fama heroo marvojaĝo de la antikva tempo (Josef Vondroušek). 5. VI. Kantvespero (La junularo). 12. VI. Atomscienco kaj la perspektivoj de la homaro (Inĝ. Ondřej Gottesman). 19. VI. Romantiko kaj realismo de Jakob Arbes (Nelly Žitová). 26. VI. Zikmund Winter, virtuozo de historiaj miniaturaj ĝenroj (Libor Kovář). 3. VII. El la plej malnova historio de la Grandmoravia regno (Vladimír Šimeček). 10. VII. Glora violonarto de Jan Kubelík (Františka Záleská). 17. VII. Disko-amanto prezentas (Jiří Kořínek). 24. VII. Tutmonda junular-organizo (František Frýbert). 31. VII. Esperanto kaj socialismo (Josef Ballay). 7. VIII. Fjardoj kaj valoj de l'Nordo (Stanislav Fröhlich). 15. VIII. Biografiaj filmoj (Marie Sousedíková). 22. VIII. Populare ĉirkaŭ la principo de la relativeco (Bohumír Horák). 29. VIII. Oratora konkurso. Tutmonda anekdotaro. — Kunvenoj ĉiumarde en hotelo Passage, Lidická 23.

Brno-Židenice. — Kurso por komencantoj kun 12. p. daŭris de oktobro ĝis aprilo. Instruis laŭ lernolibro de inĝ. Krajč kaj laŭ propra metodo prez. de la grupo Vilém Zelníček. Dum lia malsano anstataŭis lia konscienco R. Kaplerová. Por aŭtuno estas preparata kurso por progresintoj. La grupo kunvenas ĉiujare, regule alvenas vizite membroj de EK Brno.

Olomouc. — Jarkunveno de la Esperantista Societo la 27-an de februaro rememorigis agadon de mortinta pioniro

de la movado prof. Eugen Fierlinger, kiu en 1909 gvidis en Olomouc unuan kurson. La kunveno decidis elekti lin ĉin memoriam honora prezidanto. Krome estis elektitaj: Honora prezidanto fervoja ĉefinĝenero em. Josef Blažek, unu el unuaj pinoniroj inter la unuaj esperantistoj en la urbo, kiu laboras en la movado jam de 1909. Honora membro 79-jara Josef Socha en Litovel, kiu estas esperantisto de 1895. Honora membro ĉin memoriam s-o Poděbrad, laborinta en Skolta Esperantista Ligo, arestita dum okupacio de naziistoj kaj post liberigo baldaŭ mortinta. La komitato estis reelektita; restas prez. Dr. Vladimír Mohapl, sekretarioj Vašek kaj Karhan. — La 14-an de marto 1951 estis fondita en la urbo unua esperantista klubo. Rememorigis tiun daton membra kunveno la 15. III. 1951. Samtempe okazis letervespero. Alvenis 23 korespondantoj el 8 landoj. Ĉiu skribinto ricevis Albumon de la urbo, Ĉs. Konstitucion, numerojn de E-Servo. — Vintra kurso gvidita de s-oj Vašek kaj Jarmarová finiĝis kun 11 finstudintoj.

Ostrava. — Laŭ instigo de s-anino Antonie Říhová, funkciulo de Asocio de ĉeĥoslovakaj virinoj, protektanto de la Hejmo de ministraj lernantoj de minejo Šalomoun II, estas tie nun aranĝata kurso, kiun gvidas ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto Vladimír Slaný kaj partoprenas 12 ministraj lernantoj. (V. S.)

Ostrava. — Junularo raportas: 6.—7. I. 1951 partoprenis 3 s-oj regionan kunvenon en Olomouc. Januare estis malfermita kurso por komencantoj en »Armaturka« (gvidas s-o Kočvara). Dum vintra sezono nia junularo multe skiis. Preskaŭ ĉiudimanĉe Bezkydy bonvenigis gajan Esperantan skirondeton. Por plibonigi partoprenon en niaj kunvenoj ni aranĝis diagramon, pendigitan sur muro. Nun oni tuj vidas, kiu regule vizitadas nian klubon. Okaze de tradicia Esp. balo 3. 2. 1951 prezentis nia Deklama kaj kanta rondeto sian programon. La 15-an de februaro okazis la jarkunveno. Estis elektita preskaŭ la tuta komitato, ĉar multaj s-oj foriros por militservi. La 29-an de marto finiĝis kursoj por komencantoj, progresintoj kaj supera kurso. Post ekzameno ricevis ĉiuj anoj la atestojn. Komence de aprilo komenciĝis kursoj: elementa kun 11 p. gvidata de s-ino V. Sukačová, kurso progresinta kun 7 p. gvidata de s-o M. Neuvirth, supera kurso kun 10 p. gvidata s-o D. Kočvara. (Sk.)

Ostrava-Zábřeh. — Esperantista Societo Komenský decidis en sia jarkunveno la 12-an de aprilo likvidiĝi kaj eniĝi en Klerigan Kunularon (Osvětová beseda) kiel ĝia Esperantista fako. La kunvenon ĉeestis 20 membroj kaj direktoro de la Kleriga Kunularo Karel Ulman. Kunvenon gvidis prezidanto Alois Kubala. Estis starigita plano de laboro en la nova jaro. La ĉefa tasko estas restarigi monumenton el Bohumín en la parko apud Zengrova strato. Estos fabrikigitaj du propagandaj kestetoj. — Estis elektita komitato de la E-fako de la Kleriga kunularo. Prezidanto estas Alois Kubala (Rodinná 43), sekretario Bohumír Vaněk (Čermákova 6), kasisto Josef Pavlán (Zengrova 135).

Plzeň. — Elementa kurso por 10 geknaboj 10—15 jaraĵ komenciĝis la 28. III. en Regiona sekretariejo, ĉiumerkrede je la 16—18 h. gvidata de k-ino Maroušová. Pluan kurson komenculan ĉiuvendrede je la 19—21 h. por 12 p. gvidas k-ino Šloufová en la sama ejo. En la urbodomo gvidas kurson por 5 komencantoj, kiuj jam aliĝis al la Asocio, k-o Rud. Burda. — En la urbodomo fondiĝis la 27. IV. Esperantista sekcio en Kultura entreprena klubo de JNV. Estis elektitaj prez. Rud. Burda (VIII. ref., radnice) sekretariino k-ino Eisenhutová (CIS, nám. republiky), kasistino k-ino Beštová. Tiuj membroj, kiuj jam scias nian lingvon, perados kolektivajn korespondadon de fabrikoj organizaĵoj kun respektivaj organizaĵoj fremdlandaj precipe en kapitalistaj ŝtatoj.

Poprad. — Kunvenoj ĉiumerkrede ĉe s-ano M. Zvara, Masarykovo nábrežie 62.

Praha. — Jarkunveno de la Esperantista Klubo en Praha okazis 28. 3. La prezidanto Šustr malfermis ĝin per rememoro pri la mortintaj membroj kaj amikoj de Esperanto, kiam finonis la nacia himno. La sekretario J. Sviták resumis en sia raporto, ke la agado dum la pasinta jaro estis vigla kaj laŭplane disvolvata; tamen oni sentis du mankojn en la kluba vivo: mankis eksterlandaj vizitantoj kaj aranĝoj ekster la klubejo, sed la kaŭzo estis nur eksterkluba. La komitato kunvenis regule la duan lundon en ĉiu monato, sume 13-foje. La klubvesperoj havis bonan, eĉ tre altan nivelon. Teknikan plibonigon de la programoj kaŭzis aĉetita disaŭdiga instalaĵo. La membroj partoprenis ankaŭ eksterklubajn aranĝojn en Hradec Kr., Brno, Doksy, Rožnov, Svit, Litvínov kaj aliloke. Membroj de la klubo gvidis la jenajn kursojn: prof. Kochman 2 interes-rondetojn kun 35 lernantoj en la Industria lernejo Praha I, Kynčl 2 kursojn kun 25 resp. 30 lernantoj sub aranĝo de la instanco Osvětová beseda en Praha-Libeň, J. Bendová du kursojn en la poŝtista klubdomo por 6 resp. 12 partoprenantoj. En la dua duonjaro la klubo liveris instruistojn por pluraj kursoj en Osvětová beseda en Praha II (vidu raporton sur p. 30). La Junularo de la klubo ekaktivis promespene jam komence de la jaro, akiris propran klubojn kaj registris 100 membrojn. Ĝi eldonas cirkuleron kaj prizorgas varbkesletojn. Gvidanto estis J. Neumann. La plej efika propagando en la urbo estis la du grandaj montrofeneŝtroj apud la Wilson-stacidomo kaj fenestroŝildoj super la elirejo, pri kiuj skribis siatempo eĉ angla motorista gazeto. La klubo ricevis 294 leterojn kaj dissendis 4400, plejparte presaĵojn. La dissendon faciligis propra adres-aparato. Amasan ekspedadon prizorgis s-aninoj Bárachová, Baldová kaj Průšová. La aparaton manipulis Čížek kaj poste Lorenz. Lorenz funkciis denove kiel klubestro kaj registranto de programoj. Bibliotekisto Landsman rearanĝis la bibliotekon kun helpo de Šumavská kaj Rajm. La klubo havas de oktobro novan klubejon en Štěpánská 3 tre proksime de la asocia oficejo. La klubejo estas ornamita per bildoj de klubano Hrdina kun scenoj el la vivo de denaska esperantisto. — La raporto de la kasistino Bárachová montris, ke la klubo havis fine de 1950 426 membrojn (511 en 1949). Agadraporto de la junularo, prezentita de Nyvltová, estis akceptita kun vera kontenteco (v. p. 29). Revuisto Balda raportis, ke la kluba legejo estas bone provizata per eksterlandaj gazetoj kaj estas atingebla ĉiutage en la junulara hejmo. La raporto de revizoro Král pri senmanka financa mastrumado finis la unuan parton de la kunveno. La duan parton enkondukis muzika programo, prezentita de Vácová.

En la dua parto de la kunveno prez. Šustr prezentis proponon de la komitato elekti s-anon Rudolf Hromada pro liaj meritoj pri la movado, okaze de lia 60-a vivojaro, honora membro. Akceptita per aklamado. La nederlandĉeĥa s-anino Inge Bartošiková transdonis al li la diplomon. Hromada prezentis paroladon de la unua honora membro de Esperantista klubo en Praha, kiun li finis per esprimo de kredo, ke Esperanto kiel ĉiam ankaŭ estonte superos ĉiujn barojn, vivos kaj venkos. Šustr poste anoncis la plej aĝan membron, d-ron Kohoutek, kaj transdonis al li donacon. — Nova komitato estis elektita unuanime, Šustr reelektita kiel prezidanto. Lorenz konigis, ke ĵus pasis 20 jaroj de kiam Šustr prezidantiĝis, kaj transdonis al li florojn. La kunveno decidis ne formi specialan packomitaton, ĉar ni ĉiuj estas senrezervaj pacbatalantoj. Oni aprobis unuanime porpacan rezolucion kaj decidis sendi salutleterojn al kunsido de la Ĉeĥoslovaka komitato de paco-defendantoj kaj al la primatoro de Praha d-ro V. Vacek. Antaŭ la fino prof. Urban transdonis saluton de J. Baghy al la kunveno kaj deklamis lian ĉeokazan poemon. Per la »Espero« oni finis je la 22,45 h. la jarkunvenon.

La nova komitato dividis inter si jene la funkciojn: A. Slanina vicprezidanto, T. Balda sekretario, V. Boháčová helpa sekretario, A. Bárachová kasistino, A. Strejc, protokolistoj. (La ceteraj: J. Adamek, referanto pri kulturo, F.

Landsman kaj L. Kynčl, bibliotekistoj, M. Baldová, revuistino, Lorenz, klubestro, A. Janoušek kaj Š. Šumavská, arkivistoj, J. Mařík, referanto por gazetaro, F. Sviták, referanto por kontakto kun amasaj organizaĵoj, E. Nyvltová kaj J. Adamek, por la junularo, J. Kukačka, kartotekisto.) La nova komitato skizis sian agadon jene: 1. prepari por ĉiu kvaronjaro konkretan agadplanon, en kiu ĝi fikso linio de la komitatokunvenoj kaj klubvesperoj kaj antaŭ-preparos valorajn programojn kun la temoj: kulturo, ideologio, lingvo, vojaĝrakontoj, 2. prepari konkurson pri la plej bona kaj plej efika varbprelego pri Esperanto, b) pri plej efika varbfolio, c) varbafiŝo, adaptitaj al la aktuala tempo, 3. aranĝi en la aŭtuna sezono a) vastan varb-kampanjon por E. en Praha, b) kursojn elementajn kaj superajn, c) Esperantan universitaton kun prelegoj de fakuloj pri esperantologio kaj sociaj sciencoj (la tasko de Esperanto en la nuntempo). (J. M.)

Výprachtice. — Post la vizito de Lanškrounaj Esperantistoj en Výprachtice, estis ĉi tie fondita Esperanta rondeto kaj tuj la 6-an de aprilo 1951 komenciĝis ĉi tie komencula kurso de Esperanto, kiun gvidas faka instruisto Jaroslav Hošek. Kurson regule vizitas 16 partoprenantoj kaj ilia nombro senĉese kreskas.

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY

(Letní koleje esperanta v Doksech u Máchova jezera)
28. VII.—11. VIII. 1951.

O ŭčasti v kursech a seminářích, uvedených v první zprávě, bude vydáno žactvu osvědčení. Vyučováno bude denně mimo neděle od 8.—12. hod. ve školní budově. Odpoledne: pobyt na plážích jezera, koupání, společenské besedy, žhová brigáda; večer: umělecká akademie, benátská noc na jezeře, táborový oheň, lampionový taneční večer a j. Hlavní výlety: odpolední na hrad Bezděz a Kokořín, celodenní autokarový a lodní do Hřenska. — Počet účastníků omezen na 200. Přihlášky přijímají se jen do 10. července. — Do literární soutěže »IV. Floraj ludoj« přijímají se práce (dosud netištěné a ne starší jednoho roku) do 15. VII. Později došlé i jazykově vadné jsou ze soutěže vyloučeny. — Kolejné (kursové, ubytování v soukromí s poplatkem z přechodu, ubytování, odvoz zavazadel, permanentní vstupenka k jezeru, osvědčení o ŭčasti, režijní příspěvek) a stravování v restauraci celkem 1.866 Kčs, v závodní kuchyni 1.764 Kčs. Jízdné Hřensko 226 Kčs, Kokořín 80 Kčs, Bezděz 35 Kčs. Přihlášky (se současným zasláním peněz bíanco složenkou na šek. ŭč. 729.501 Okresní spořitelny a záložny v Doksech pro ŭč. LKED č. 2240 řiďte na L. K. E. v Doksech u Máchova jezera č. 453. — Bližší informace o LKED 1951 najdete v prospektu, jež si vyžádejte.

III. LETNÍ KURSY ESPERANTA V ROŽNOVÉ POD RADH. od 14.—28. července 1951

pořádá Svaz esperantistů kraj Ostrava pod záštitou MNV v Rožnově p. R. — Město v malebném údolí mezi horami, východisko výletů na Lysou horu, Radhošť, Pustevny, Bílý Kříž, Velký a Malý Javorník, Ondřejník atd. — Krásný lesní park s valašským museem v přírodě.

1. Kurs pro začátečníky.
2. Kurs pokračovací a konverzační.
3. Vyšší kurs pro hlubší studium a pro kandidáty na učitele esperanta.

Vyučování od 8.—12. hod., odpoledne výlety, koupání, večer zábavný program. — 14denní pobyt (kursové, byt, strava, lázeňská taxa, autobus na údolní přehradu v Bystřičce)

při společném ubytování Kčs 1.500,—
při ubytování v hotelu Kčs 1.750,— — 1.800,—
při ubytování v soukromí Kčs 1.610,— — 1.680,—
O slevu jízdného požádáno. — Napište si (co nejdříve)

o bližší informace na adresu:

Vladimír S l a n ý, Kutuzovova 29, Ostrava-Vitkovice.

Vychází měsíčně (12krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze II, Malá Štěpánská 7. Odpovědný zástupce listu Dr. Stan. Kamarýt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 100 Kčs. ŭčet pošt. spoř. 9.602. Tiskne Orbis, n. p., závod 6, Praha XVI, Plzeňská 66. ŭčast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt v Praze č. j. IA-Gre-2372 OB-48. Dohládací poštovní ŭřad Praha 022.